

Hector Hodler, pioniro de la mondfederalismo

Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI, 1987 marto 12 kaj 14

<http://www.esperanto-gacond.ch/SRI/Radiokasedo87-09/SRI-1987-09-A-3-1987-marto-12-14-Claude-kaj-Andree-GACOND-Studo-de-Hector-Hodler-pri-la-pacproblemo.mp3>

Cl.- Parolas nome de Svisa Radio Internacia gesinjoroj Claude kaj Andrée GACOND.

Komence de sia tre detala studo pri la pacproblemo, Hector Hodler konstatas, ke (ni citas) "estas malfacile trakti la militproblemon, ne nur ĉar ĝi estas jam malfacila per si mem, sed ankaŭ ĉar eĉ la plej trafaj argumentoj kaj rezonadoj senĉese rompiĝas kontraŭ la enradikigitaj kredoj pri absoluta justeco de la propra nacio." (El la artikolo "Novaj vojoj I", Esperanto julio 1915). Kaj li aldonas: "Kontraŭ tiu kredo, la racio estas tre malforta. Nur iom post iom, kun la apogo de la faktoj, ĝi agas." (Idem).

A.- Ne abundis la eŭropanoj, kiel Hector Hodler, kiuj en la jaro 1915 kapablis senpasiere raporti pri la militokazaĵoj kaj analizi la naciisman fenomenon, kun la objektiveco de ekstera observanto. El sia ĝeneva observejo, la direktoro de UEA publikigas siajn malkovrojn en la revuoj "Esperanto" kaj "La Voix de l'Humanité", priskribante la psikologion de la batalantoj. Tiuj konsideroj valoras por ambaŭ flankoj de la militantaj blokoj. Jen ekzemplo:

Cl.- "Por la tre granda plimulto de la homoj, la demando estas efektive ekstreme simpla. Kulpa estas nur la malamiko. **Ĝi** volis la militon, **ĝi** atakis, **ĝi** rifuzis ĉiujn pacajn solvojn. Sekvas el tio, ke sufiĉas ĝin bategi, tiel ke ĝi ne plu kuraĝu rekomenci antaŭ kelkaj generacioj. Daŭran pacon ĉiu deziras, sed ĉiu samtempe opinias, ke tiun celon oni povas atingi nur per plena venko super la malamiko, al kiu oni aljuĝas la tutan respondecon de la katastrofo. Tiu opinio havas la profiton, ke ĝi trudas kiel eble plej malmulte da pripenso. Ĝi lasas liberan kampon al la pasioj, kaj trankvilige efikas je la spirito. Plie, el la nacia vidpunkto ĝi estas necesaĵo: oni malpli volonte oferas sian vivon, se la analizo jam ŝancelis la kredon pri la absoluta praveco de la propra lando."

A.- Tiaj objektivaj konsideraĵoj pri la militfenomeno aperis en la revuo "Esperanto" en la rubriko titolita "nuntempaĵoj". Ili tre similas al la priskriboj, kiujn faras psikiatroj pri la konduto de siaj pacientoj, kaj fakte Hector Hodler observadis la batalantan naciaron, kiu lin ĉirkaŭis, sammaniere kiel kuracisto ekzamenas la disvolviĝon de malsano, por povi objektive malkovri ne nur ĝiajn kaŭzojn kaj karakterizojn, sed por ankaŭ diveni kuracrimedojn.

Cl.- Tiuj objektivaj priskriboj de la militfenomenoj tutcerte konsistigas valoraĵon de la originala ĵurnalisma literaturo en esperanto. Bedaŭrinde, en la kursoj pri la literaturo de esperanto, oni ĝenerale neglektas la hodleran eseon pri la pacproblemo, verŝajne ĉar ĝi tro vigle ŝokus la naciismajn sentojn de la kursanoj. Malmultas la esperantistoj, kiuj kapablis akiri supernacian mondpercepton, kaj kiuj nome de sia esperantismo malsolidariĝas de la naciistoj, kies spirita horizonto ne pli vastas ol la landlimoj de la propra gento.

A.- Hector Hodler estas konvinkita, ke oni devas elimini ĉian antaŭkonsideron filozofian, politikan, nacian, sektan, ktp, kiam oni volas analizi la pacproblemon. Li eĉ riproĉis al la pacistoj ilian mankon de objektiveco, sen kiu ne ekzistas vera scienca serĉado. En sia senantaŭjuĝa observado de la kolektiva konduto de la homoj, Hector Hodler provas alveni al bazaj konstatoj, kiujn li sufiĉe draste formulas.

Cl.- Li ekzemple konstatas, ke senescepte en ĉiu nacio la "milithelpado vekas ĉies simpatieon kaj kunlaboron" dum la "batalo kontraŭ la militsistemo estas konsiderata aŭ kiel utopia okupo aŭ apenaŭ atentinda aŭ kiel danĝera agado nepre ĉesigota." (Idem).

A.- Ni timas, ke ne multe evoluis la situacio ekde 1915.

Cl.- Hector Hodler opinias sufiĉe vana la laboro de la socialistoj, feministoj kaj aliaj reformemuloj revoluciuloj kiuj celas plibonigi la vivkondiĉojn sen objektive lukti kontraŭ la internacia anarkio. Ni citas: "En la nuna tempo unu problemo superregas ĉiujn aliajn, nome la starigo de internacia ordo. Antaŭ ol plibonigi la kondiĉojn de la vivo, necesas unue, ke la vivo estu. Nun la internacia anarkio grave endanĝerigas nian vivon kaj minacas la kulturvalorojn akiritajn de la antaŭaj generacioj. Savi la civilizacion estas la unua devo: poste plibonigi." (Novaj vojoj II, aŭg.1915)

A.- Ni diris, ke Hector Hodler en sia analizo de la pacproblemo distanciĝis de la pacistaj solvoj. En pluraj artikoloj li tre detale ekzamenas iliajn proponojn, por montri, ke tre ofte ilin produktis neobjektiva observado de la interpopola konduto. La temo arbitracio multe okupis lin. Ĝin li tre detale analizis en pluraj artikoloj, por alveni al la konkludo, ke arbitracio sola, eĉ ĝeneraligi ne sufiĉas por ĉesigi la militajn agojn inter la nacioj. Nur tutmonda federacia organizo posedanta federacian armeon, kiu estas kapabla devigi la federaciigintajn naciojn al respekto de la arbitraciaj decidoj, alportus la necesan politikan kaj juran bazon por la elimino de la internaciaj militagoj. Ni citu lin:

Cl.- "Interne de sama regno, la rilatoj inter la individuoj, kaj inter la ŝtato kaj la individuoj, estas fiksataj per leĝoj kaj reguloj, kies kolekto formas veran pozitivan juron, kiu per sankcioj devigas ĉiun regnanon je alkonformiĝo. La publika nacia rilataro estas do plene organizita. Kontraŭe, la internacia rilataro restas en ĥaosa anarkia stato, ĉar la suverenaj ŝtatoj estas subordigitaj al neniun supera potenco kaj rekonas la internaciajn regulojn, kiujn trudas la komuna vivado, nur tiom, kiom ili estas akordigeblaj kun la naciaj interesoj - sola kriterio." (Novaj Vojoj, septembro 1915)

A.- La solvo, kiun proponas Hector Hodler, por konstrui mondon, kie la militagoj inter la nacioj eliminiĝas, ricevis la nomon de mondfederalismo. Nek Ligo de Nacioj nek poste Unuiĝinta Naciaro elektis tiun ĉi vojon, sed ekde post la dua mondmilito kreskas la nombro de la fakuloj pri internacia juro, kiuj opinias, ke la sola vojo al la paco ĝuste estas la kreo de tutmonda federacio. Por konkludi nian hodiaŭan elsendon, ni ankoraŭ citu konstaton de Hector Hodler ĝuste pri la neceso krei mondfederacion:

Cl.- "Duobla necesajo sin trudas...: starigi internacian ordon, tio estas krei politikan unuiĝon inter la ŝtatoj, federacion, interkonsenti pri jurprincipoj tiaj, ke ĉiuj ŝtatoj estu fonditaj sur la konsento de siaj anoj, ne plu sur la perforto de la armiloj. Kiam tiuj principoj fariĝos realajo, anstataŭ reprezenti teorion deziresprimon, la homaro estos efektiviginta unu el la plej gravaj politikaj transformoj, kiuj iam okazis." (El la artikolo "Novaj Vojoj VI, "Esperanto" decembro 1915)

A.- Vi aŭdis elsendon de Svisa Radio Internacia. Gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond parolis pri Hector Hodler. Ĝis reaŭdo !